

Similaĵoj inter esperanto kaj la ĉeroka lingvo
laŭ *La ĉeroka esperantisto* de Vilĉjo Valdono

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 julio 07.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-18/SRI-1988-18-B-6-Claude-kaj-Andree-GACOND-Similajho-inter-esperanto-kaj-la-cheroka-lingvo-lau-La-cheroka-esperantisto-de-Vilchjo-Valdono.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

La 19-an aŭ 21-an de majo 1988 vi eble aŭdis elsendon pri la ĉeroka lingvo. Jen hodiaŭ dua raporto pri tiu lingvo laŭ letero ricevita de Billy WALDON, kiun ni gastigis antaŭ kelkaj jaroj. Ni komencis raporti al vi pri la trista sorto de la ĉeroka etno en Usono. Tiu indiana popolo estas tutcerte viktimo de la blankula invado, kiu naskis la hodiaŭajn ŝtatojn en Nordameriko, detruante la indianajn ŝtatajn strukturojn. Billy WALDON, kiu estas ĉeroko, plendas, ke en *Tahlequah*, la ĉefurbo de la ĉeroka civito Oklahomo, la instruado de la ĉeroka lingvo estas leĝe malpermesata en la lernejoj kaj ke la ĉerokoj ne rajtas elekti sian propran ĉefon. Kio distingas la ĉerokan lingvon de la ceteraj indianaj idiomoj, tio estas, ke dank' al la genio de la ĉeroko *SEQUAYAH* (Sekvojo), inventinto de silabaro, ĝi fariĝis lingvo kun propra skribsistemo kaj literaturo jam komence de la 19-a jarcento, kiam la ĉeroka ŝtato ankoraŭ ekzistis.

A.- Ekde 1818 la gazeto *La Ĉeroka Fenikso* mondscale konigis tiun indianan lingvon, kiu lingvistike fariĝis la simbolo mem de la polisintezaj lingvoj. Kaj Billy WALDON opinias, ke ZAMENHOF ĉerpis elementojn el la ĉeroka lingvo, kiam li verkis sian lingvo-projekton.

Cl.- Ni ne scias, ĉu tiu indiano pravas en siaj asertoj. Tamen estas interese legi, ke por ĉeroko esperanto ne estas fremda afero, ke indiano povas identiĝi kun karakterizaĵoj de esperanto.

A.- Ni citu tion, kion tiurilate Billy WALDON diras en sia cirkulera letero, kiu anoncas la kreon de gazeto titolita *La Ĉeroka Esperantisto*:

Cl.- En la esperanta kaj en la ĉeroka, sed ne en la angla (la plej granda eŭropa lingvo oni:

A.- Unue: faras grandan uzadon de kunmetiteco kaj afikseco.

Cl.- Due: Uzas la vokalon a por sufikse esprimi la estantecon.

A.- Trie: Uzas la vokalon i por sufikse esprimi la pasintecon kaj la infinitivon.

Cl.- Kvare: Uzas la vokalon o por sufikse esprimi la estontecon.

A.- Kvine: Uzas la vokalon u por afikse esprimi la kondiĉon kaj la imperativon.

Cl.- Sese: Uzas la demandan silabon ĉu.

A.- Ekzistas multaj pliaj similaĵoj, daŭrigas Billy WALDON, klarigante, ke pri ĉio tio li raportos en la gazeto *La Ĉeroka Esperantisto*.

Cl.- Tiu gazeto tutcerte altiros la atenton de la esperantologoj kaj interlingvistoj, kiuj interesiĝas pri la etimologio de la esperantaj vorteroj. Billy WALDON atentigas ilin pri novaj esplorkampoj. Ni ree citu lin:

A.- Ĉu la radiko *edz* venis el la ĉeroka? Esperantologoj diras, ke la radiko *edz* estas la sola radiko en la *Fundamento*, kiu ne venis el iu nacia eŭropa lingvo. Ekzistas diversaj malkonsentoj kaj teorioj pri ĝi. Ekzistas multaj tre interesaj paraleloj kaj samaĵoj inter la vivoj de SEKVOJO kaj ZAMENHOF, rakontotaj en *La Ĉeroka Esperantisto*. La plej okulfrapa estas la fakto, ke la patro de Zamenhof bruligis la skribaĵojn de Zamenhof same kiel la edzino de Sekvojo bruligis la skribaĵojn de Sekvojo. Atentu, do, ke la plej okulfrapa paralelo rilatas al la *PATRO* kaj la *EDZINO*. *PATRO* en la ĉeroka lingvo estas *edod*; kaj *PATRINO* en la ĉeroka estas *EDZINO*. Do, *edod* kaj *edzino* estas tute ĉeroklingvaj vortoj. Sed, ili estas preskaŭ esperantaj, ĉu ne? Oni nur devus forpreni *d* kaj enmeti *z* ĉe unu kaj fari nenion al la alia. Jen la demando: ĉu Zamenhof sekvojante sekvis la sekan vojon de Sekvojo?

Cl.- La argumentado de Billy WALDON ne estas tre scienca. Li miksas argumentojn subjektivajn, kiel la bruligon de la manuskripto, kun faktoj lingvaj, kiel la simileco de la vortoj *edod* kaj *edzo*, kaj *edzino* en la ĉeroka kaj en esperanto. Sed unuafoje oni aŭdas tiun ĉi argumentadon, kaj apartenos al la lingvistoj sisteme esplori la dokumentojn, kiujn Zamenhof estus povinta konsulti en ruslandaj bibliotekoj pri la ĉeroka lingvo, por dedukti ĉu la asertoj de Billy WALDON korespondas al realaĵoj. Tiam eble montriĝos erara la teorio, kiu asertas, ke Zamenhof elektis laŭ la alfabeto ordo la vokalojn *a, e, i, o, u* por sufikse esprimi la nociojn de nuneco, estinteco nefinita, estinteco finita, estonteco kaj hipotezo, kaj ke poste li rezignis distingi la nefinitecon de la finiteco en la pasinta tempo, kaj ke tial la vokalo *e* malaperis el la verbaj finaĵaro. Povas esti, ke la indiana sistemo allogis lin. Des pli, ke la vokalo *i* en ambaŭ lingvoj ne nur markas la estintecon, sed ankaŭ la infinitivon, laŭ la diroj de Billy WALDON.

A.- Billy WALDON poste demonstras, ke esperanto gajnus inspiriĝi de la vortkrea sistemo de la polisinteza lingvoj. Li eĉ inventas esperanto-variantojn polisintezaĵajn, kiujn li nomas poliespo. *Poliespo* estas *polisinteza esperanto*. Ĝi estas indianigita esperanto.

Cl.- Ni donu kelkajn klarigojn, citante Billy WALDON:

A.- En esperanto kaj en la angla oni devas diri almenaŭ 3 vortojn por esprimi subjekton, verbon kaj objekton. En polisinteza lingvo oni povas kaj tre ofte diras subjekton, verbon kaj objekton en unu sola vorto. Al tiu polisinteza lingvo-grupo apartenas la ĉeroka, vaska, azteka, eskima lingvoj. Sed neniu lingvo estas centprocente polisinteza. Ekzemple la ĉeroka ne estas centprocente polisinteza.

Cl.- Billy WALDON malkovris, ke la Zamenhofa esperanto povus asimili vortfaradajn regulojn proprajn al la ĉeroka lingvo, kaj ke, ni citas lin, "La bela afero pri poliespo estas, ke oni havas elekton. Kiam poliespo pli simplas kaj utilas: uzu ĝin. Sed kiam normala esperanto pli simplas kaj utilas, uzu ĝin.

A.- Perradie ni ne povas legi la klarigojn pri la funkciado de polisinteza lingvo. Interesatoj tutcerte legemos la gazeton *La Ĉeroka Esperantisto*, kaj povas esti, ke kelkaj eroj el la

projekto poliespo inspiras la esperantoparolantojn kaj la esplorantojn, kiuj provas uzi esperanton por la aŭtomata tradukado. Estas fakto, ke en Eŭropo oni subite interesiĝas pri la vaska lingvo, malkovrante, ke ĝi havas karakterizaĵojn, kiuj povus utili al la interlingvistaj esplorantoj, kiuj provas igi esperanton ankoraŭ pli fleksebla, ol ĝi fakte estas.

Cl.- Al tiuj, kiuj ŝatus ricevi la unuan numeron de *La Ĉeroka Esperantisto*, kiu estas jam eldonita, ni volonte donos la konvenan adreson, se ili ĝin petos tra la kanalo de la esperantofako de Svisa Radio Internacia.

A.- Estas fakte interese konstati, ke esperanto facile adaptiĝas al diversaj lingvo-sistemoj. Ĉeroko entuziasmiĝis por la zamenhofa idiomo, ĉar li sentas, ke ĝi iel similas al lia lingvo, kaj ke ĝi havas la latentan kapablon akiri polisintezan spiriton, kaj ke tio estus riĉiĝo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND raportis pri interesa cirkulera letero, kiun la ĉeroka indiano Billy WALDON dissendis, anoncante la naskiĝon de nova gazeto: *La Ĉeroka Esperantisto*. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014